

(“71”) 415.4 (1867, Faraday)

FARADAY KAJ ETIMOLOGIO

(K. J. Young, Crowthorne, Britujo)

1967 vidis la centjaran datrevenon de la morto de Miĥaelo Faraday, kiu naskiĝis en 1791, filo de forĝisto. Li estas fama precipe pro sia malkovro de la elektromagneta indukto, kiu ebligis la ekspluatadon de la generatoro, elektra motoro kaj transformatoro, la bazoj de la moderna elektra industrio. Li ankaŭ faris multajn esplorojn pri elektrokemio, elektrolizo kaj funkciado de piloj kaj baterioj. Li montris la identecon de ĉiuj specoj de elektro; ĝis tiam oni distingis pilan, ordinaran (ekz. atmosferan), magnetan, terman, kaj bestan elektrojn.

Malpli konata estas lia kontribuo al teknikaj terminoj. Konsulte kun Whewell li kreis kaj uzis la vorton 'elektrodo' el la grekaj radikoj 'elektron' (sukceno) kaj 'odos' (vojo). Ili antaŭe nomiĝis simple 'polusoj'. Simile 'anodo' kaj 'katodo' kreiĝis el 'odos', 'ano' (supren) kaj 'kata' (malsupren). Mnemoniko de Faraday rilatigas tiujn esprimojn al sunleviĝo (oriento) kaj sunsubiro (okcidento), laŭ la supozo, ke la kurentoj estigantaj la magnetan kampon de la tero fluas en la sama direkto, kiel la suno ŝajne vojaĝas. Plue li enkondukis la vortojn 'jono', 'anjono' (jono, kiu iras al la anodo), kaj 'katjono' (jono, kiu iras al la katodo). En la greka, 'anion' signifas leviĝanto, kaj 'kation' subiranto. Elektrolito kaj 'elektrolizi' same fontas de lia plumo, kaj esprimas la specialan formon de malkomponado, kiun li pritraktis.

Li estis sincera kristano el malgranda sekto, kaj ĉiam plena de entuziasmo por la scienco. Li volonte forlasis profitdonan analizadon por sin doni tute al sciencaj esploroj; kaj estas ironia fakto, ke tiu, kiu kreis tiom da riĉo por la mondo, mem mortis relative malriĉa. Eĉ la honoron estiĝi Prezidanto de la Royal Society, la plej elstara scienca societo en Britujo, li firme rifuzis.

Referenco:

Eksperimentaj esploroj pri elektro (paragrafoj 399-402), M. Faraday, J. M. Dent, London, 1951, (en la angla).

(621.391 + 518.5) : 652.6 (= 408.92)

PO-VORTA TRADUKO DE ESPERANTO FARE DE KALKULILOJ

(M. E. Falla, English Electric Computers, Britujo)

Resumo

Po-vorta traduko estas la traduko de vortoj aŭ radikoj en teksto individue, unuope sen konsidero de iliaj kuntekstaj rilatoj. Ĝuste kiel listo de novaj vortoj ĉe la komenco de leciono aŭ ekzercaro helpas lernantojn, tiel listo de vortoj po-vorte tradukitaj povas helpi ne-esperantistajn aŭ duonesperantistajn legantojn de Esperanta scienca aŭ faka teksto.

Ĉi tie mi celes prezenti kelkajn pensojn pri la uzo de elektronaj kalkuliloj por produkti tiajn helpilojn. Post diversaj rimedaj proponoj mi konsideras uzojn de la tekniko kaj la neceson de nacilingvaj gvidlibroj tra la lingvo por inteligentuloj, neceson kiun akriĝus sed certe ne estigus aŭtomatigita po-vorta traduko.

Enkonduko

Unu el la esencaj ecoj de Esperanto estas tio, ke ĝi estas aglutina. Oni formas vortojn per kunmeto de memstaraj vorteroj kiuj preskaŭ ne ŝanĝas siajn signifojn kaj tute ne siajn formojn. Tio ebligas ke per nur malgranda scio de la reguloj de la lingvo kaj multe da uzo de la vortaro oni povas — sen antaŭa studo — legi tekston Esperantan. Ĝuste tia Zamenhof kreis la lingvon. Por tio ni havas la 'stosilojn'.